ADORU 345



2. Ho, supre estas nokto for,
neniam sonas ploro,
kaj tie, kie la trezor',
ja estu mia koro.
Mi ĉiam havu kun fidel'
kunecon mian en ĉiel'.

3. Kaj kiel iris, same Vi,
Jesuo, venos ree.
Laŭ Via volo vivos mi,
preĝante kaj obee;
ne scias horon de l' reven',
sed Vin atendas ĝis maten'.

4. Feliĉa estas la servant',
se tia Vi lin trovos;
ĉe la reveno, ho Savant',
Vi lin konduki volos
al Via Patro laŭ promes' –
al gloro kaj al senmortec'.

TILL HÄRLIGHETENS LAND IGEN • SPB 159 • M (Eisenach): Bartholomäus Gesius 1605, Johann Hermann Schein 1628, GL 616, EG 385, RG 812, EM 312, 560 kaj 644 • sveda T: Johan Olof Wallin 1816 • E: Magda Carlsson-Bohman,1962 en EKA 23 • AK 76 • ↑ Apo 19,9